Nerono (I)	*Nerō*	-
Niceo (G)	*Nicæa*	*Iznik* (tr)
Cezaro Oktaviano (I)	*Gaius Iulius Cæsar*	*Kaiser Augustus* (de)
Aŭgusto (I)	*Octaviānus Augustus*	-
Pado (G)	*Padus*	*Po* (it)
Palestino (G)	*Palæstīna*	*Palaistīnè* (gr)
Platono (P)	*Platō*	*Πλατων* (gr)
Ponto Milva (G)	*Pons Milvius*	*Ponte Molle* (it)
Rejno (G)	*Rhēnus*	*Rhein* (de)
Remo (P)	*Remus*	-
Romo (G)	*Rōma*	*Róma* (it)
Romulo (P)	*Rōmulus*	*Ròmolo* (it)
Sofio (G)	*Serdica / Sardica*	*Sofia* (bg)
Tarkvinioj (P)	*Tarquinii*	-
Teodora (P)	*Theodora*	-
Tesaloniko (G)	*Thessalonīcē*	*(Thes)-Saloniki* (gr)
Tiberio (I)	*Tiberius*	*Tibèrio* (it)
Tibero (G)	*Tiberis*	*Tiber* (de)
Tiruso (G)	*Tyrus*	*Týros* (gr)
Treveri (G)	*Augusta Treverorum*	*Trier* (de)
Trojo (G) vd. Iliono	*Troia*	*Troja* (gr)

Klarigo de la mallongigoj

G = nomo de geografiaĵo	ar = araba lingvo
I = nomo de imperiestro	bg = bulgara lingvo
P = nomo de persono	gr = greka (malnovgreka)
P/D = nomo de Dio	es = hispana lingvo
en = angla lingvo	it = itala lingvo
fr = franca lingvo	sr = serba lingvo
de = germana lingvo	tr = turka lingvo

Adreso de la aŭtoro
Gerhard Kalkhof
An der Ritsch 17
DE – 36341 Lauterbach / GERMANIO

Priaŭtora informo

Emerita instruisto, komencis 1978 verki lokajn historiaĵojn kaj historiajn skizojn. (Bedaŭrinde ni ricevis la funebran sciigon, ke la aŭtoro forpasis. Nekrologo sekvos en SR 2/2006.)

Egalrajteco kaj ekonomieco en la internacia komunikado [1]

Ottó HASZPRA *

Enkonduko

Estas sufiĉe ĝenerala, kvankam ne tro konata fenomeno, ke la interesiĝo de la natursciencaj kaj teĥnikaj esploristoj, precipe en sia iom alta aĝo, turniĝas al la socisciencoj, artoj kaj certaj pli ĝeneralaj problemoj de la homaro. Do, kial ne la dua, do ordamembra[4], seĝokupa prelego povus prezenti ian ne-ĉefokupan temon, kvazaŭ "violonon de *Ingres*" [5]?

Mi mem – krom mia inĝeniera profesio – plurfoje okupiĝis pri la laŭeble optimuma solvo de la lingva problemo de la Eŭropa Unio, eĉ de tiu de la tuta mondo. "Optimuma solvo" signifas: la plej malmultekosta kaj samtempe ankaŭ ekonomie kaj politike sendiskriminacia solvo por lingve kapabligi ĉiun homon por laŭplaĉe fari, utiligi kaj ĝui pacajn internaciajn kontaktojn (kulturajn, teĥnikajn, sciencajn kaj amikajn).

Ĉio ĉi estas realigebla per lingvo, kiu estas **viva**, tamen multe pli facile lernebla ol kiu ajn **nacia** lingvo: ĝi estas la internacia lingvo Esperanto. Esperanto estas arte – eĉ belarte – renaskita, simpligita kaj alte esprimiva moderna posteulo de la nekonata praulo de la hindeŭropaj lingvoj kaj la plej bona komuna ido de ĉi lastaj.

Pri la pasinteco de la internacia komunikado

Nur skize trakurante la historion de la interkomunikado de diverslingvaj komunumoj, la paca versio de la komencaj kon-

* Memore al la hungaraj akademianoj esperantistaj, de *Sándor Giesswein* [2] ĝis *Károly Simonyi* [3]

taktoj inter migrantaj grupoj kaj triboj (unuavice en la varo-interŝanĝo, poste en la vendado-aĉetado) estis la popola "montrado/gestado", dum la traktadoj inter la gvidantoj (komercistoj, tribestroj) okazis perhelpe de la spontane formiĝinta lingvoscia elito, al kiu povis kompreneble aparteni ankaŭ tribestroj.

En malpli pacaj cirkonstancoj unu el la triboj aŭ popolgrupoj eble la batalistojn de la alia ekstermis, la aliajn membrojn sklavigis kaj eble disdonis inter siaj batalistoj aŭ inter ties familioj, kaj dum unu aŭ du generacioj senigis ilin de ilia propra lingvo kaj transformis ilin en sian propran parton.

Se la sklavigita popolo estis tro granda, ĝi povis teni sian patrolingvon, kaj la konkerintoj fandiĝis en ilin lingve, tamen konservante sian gvidrajton fojfoje tra pluraj generacioj, kiel tio okazis ekz. kun la protobulgaroj.[6] Dum longaj pacaj periodoj diversaj lingvaj grupoj povis vivi – kaj miksite, kaj rigoroze aparte – ili povis migri aŭ filtriĝi, ilia lingvolimo povis grave formoviĝi, la lingvo mem grave kreski, sed ankaŭ malaperi ktp.

Ne el paca periodo, sed el kelkaj pacaj tagoj mi citus interparoladon el la "Geografio" de *Strabón* (1977), kio okazis en 326 antaŭ nia erao inter la hindia filozofo *Mandanis* kaj la komisiito de Aleksandro la Granda *Onesikritos*. *Mandanis* skizis al *Onesikritos* tiujn principojn, kies sekvado estas utila por la gvido de la ŝtato. Tamen doni detalan pruvon de la utileco li rifuzis, dirante, ke "tra la tri interpretistoj (verŝajne temas pri greka-aramia, aramia-persa kaj persa-sanskrita) – kiuj krom la lingvon komprenas neniom pli, ol la amaso – li ne kapablas prezenti la pruvon de la utileco. Ja, tio estus simila al tio, kiel se iu volus, ke tra la koto fluu pura akvo".

Sur la terenoj, okupitaj en tri kontinentoj de la Romia Imperio, la loka nobelaro kaj la urbaj gvidaj tavoloj transprenis la Latinon, riĉiĝintan per grekaj elementoj. Pro kio, multe pli poste, en 1802, *Ésaiás Budai*, multoscia profesoro de la kolegio en la urbo *Debrecen* (en Hungario), jene enviadis la Romianojn: „Pri la lernado de lingvoj tiom, kiom ni, ili ne turmentiĝis. Ili devis lerni la unununan Grekan lingvon por havi la ŝlos-

ilon al ĉiuj sciencoj" [*Budai* 1802]. Tamen, dum la kelkcent jaroj post la falo de la Romia Imperio, la lokaj lingvoj de la kamparanoj, en interefiko kun la latina lingvo, naskis novajn lingvojn, kiuj jam ne estis konsidereblaj kiel dialektoj de la Latina, aŭ de la lokaj lingvoj, sed novaj, kvankam orelfrape parencaj, t.n. "romanaj", aŭ "novlatinaj", aŭ "latinidaj" lingvoj (itala, franca, hispana, portugala, rumana kaj kelkaj aliaj lingvoj de nacimalplimultoj, kiel la romanĉa, friula, okcitana, kaj la kataluna, valenciana, galega k.a., resp., en Svisio, Italio, Francio kaj la Iberia duoninsulo).

La latina lingvo efikis pli aŭ malpli ankaŭ al la elformiĝo de la angla kaj aliaj eŭropaj lingvoj. Tiuj tamen ne estas kvalifikeblaj kiel novlatinaj lingvoj, kvankam ili konservis konsiderinde grandan – kaj kvankam iel-tiel deformitan, tamen bone rekoneblan – latinan-grekan vortaron, hodiaŭ grandparte kvalifikeblan "internacia". Tiu ĉi vortaro, dum la eŭropa disvastiĝo de la kristanismo, plejparte pace filtriĝis en la nordajn kaj mezkaj orient-eŭropajn lingvojn, tiel ankaŭ en la hungaran, kaj poste en la periodo de la koloniigo – kune kun multaj vortoj de la konkerantoj – pli aŭ malpli en ĉiujn lingvojn. Ĉi tiu fenomeno daŭras ankaŭ en la periodo de la pacaj kontaktoj, ĉefe rilate al la scienca kaj teĥnika lingvoj.

La mezepoka latina lingvo restis ĉ. ĝis la 17a-19a jarcentoj la lingvo de la politiko kaj la scienco, sed tiam la naciaj – propre la ŝtataj ĉefaj – lingvoj transprenis ankaŭ tiun rolon kaj klopodas ĝin praktiki ĝis hodiaŭ. En Mez-Eŭropo, dum la 18a–19a jc. okazis tiu ŝtorma evoluo, kiun ni nomas lingvo-renovigo [*Berend* 2003]. Dum tiu, ĝenerale kiel sekvinda ekzemplo estis konsiderata la esprimkapablo de la okcidentaj lingvoj, kaj parte per la iom modifita transpreno de la vortoj de la latina kaj kelkaj okcidentaj lingvoj, pli vastaskale tamen per la utiligo de la ebloj kaŝiĝantaj en la popolaj lingvoj, la mezeŭropaj lingvoj atingis tian esprimkapablon, per kio kreiĝis lingva kulturo (beletro kaj fakliteraturo), kvankam kvante iom pli malgranda, sed kvalite mezurebla al la okcidentaj. Konsiderante la metodon, deviis de la aliaj eble la novigantoj de la rumana lingvo, ĉar sur

la popolan lingvon ili apogis sin nur modeste, sed klopodis forigi la slavajn elementojn kaj alpreni francajn kaj italajn.

En la 18-a ĝis la 20-a jc. la disvolviĝo de la scienco kaj teĥniko antaŭeniĝis unue en la Okcidenta Eŭropo (pleje sur la angla, franca, germana kaj itala lingvoteritorioj) poste en Usono kaj Japanio. Tamen – pro la plej sukcesaj koloniigoj kaj la venko en ambaŭ mondmilitoj – la disvolviĝo kaj precipe la disvastiĝo de la angla lingvo multe antaŭis tiun de la aliaj lingvoj – kaj tion ne ŝanĝis eĉ la posta likvidado de la kolonia sistemo. La aliaj lingvoj disvolviĝas pli kaj pli per la transpreno de vortoj kaj esprimoj el la angla, kaj tio validas ne nur por la scienca, sed ankaŭ por la komuna lingvoj.

En la lastaj jardekoj la evoluo de la nacilingvaj fakliteraturoj reduktiĝis, la fremdlingvaj resumoj en la fakrevuoj reduktiĝas pli kaj pli je la angla, la nacilingvaj fakperiodajoj parte ĉesas, parte laŭ-enhave retroevoluas. Multaj fakuloj jam preskaŭ ne publikigas en sia gepatra lingvo. Estas en simila situacio ankaŭ la nacilingva scienca libroeldonado. La traktadaj kaj publikigaj lingvoj de la internaciaj konferencoj dum niaj tagoj pli kaj pli reduktiĝas al la angla lingvo.

La kosto de la lingvolernado

Estas konate, ke infanoj facile lernas lingvon. Dum sia dua vivojaro ili jam ekparolas la gepatran lingvon kaj – en taŭga ĉirkaŭaĵo – ankaŭ alian lingvon. Je sesjara aĝo ili alproprigas la lingvo(j)n jam ĝis tia nivelo, ke ili iĝas taŭgaj por komenci viziti la elementan lernejon. Tamen la vera miraklo estas, ke surbaze de simpla imitado kaj senĉesa ripeta praktikado ili entute kapablas komenci la lernadon de lingvo, kiam la unuopaj songrupoj kaj la fenomenoj de la ĉirkaŭaĵo ĉiuj estas nekonataj por ili, kaj ne nur tiujn, sed ankaŭ la rilatojn inter tiuj ili devas malkovri.

Tiu lernado, komence tute sen klarigoj kaj bazita sur sonimitado – konektata kun la senĉesa funkciado de la sensorganoj kaj korpopartoj, la ofta kunagado de la patrino kaj la familiaj membroj, poste kun la ofta kunagado de la ampleksiĝanta socia ĉirkaŭaĵo paralele kun la ekkonado de la fizika ĉirkaŭaĵo – preskaŭ plenigas ilian tutan maldorman staton. Sekve, ili alproprigas kaj ekzercas la lingvajn konojn necesajn por komenci la lernejon (kvankam diversgrade, depende de la ĉirkaŭajo kaj la individuaj donitaĵoj) dum 10–20 mil horoj, sed tion ili sentas ne laciĝo, aŭ se ili laciĝas, simple ekdormas.

Poste la diversgradaj interesiĝo kaj kapablo, influataj ankaŭ de la personeco de la instruistoj, rezultigas laŭ la lernobjekto diversgradajn alproprigon aŭ rifuzon, kaj tio validas ankaŭ pri la lingvo (aŭ lingvoj). Oni povas diri, ke en la aĝo de lernanto kaj juna adulto la parola kaj skriba alproprigo de la unua fremda lingvo – sur komunlingva kaj ankaŭ en iu fako bone uzebla komunika kaj komprena nivelo – bezonas ĉ. 2000 horojn da sistema lernado (plus oftan uzadon), kvankam – bedaŭrinde – tio estas ankoraŭ malproksime de la gepatralingva nivelo. Dum duone tiom da tempo nur malmultaj estas kapablaj alproprigi tian scion, kaj estas ankaŭ tiaj, por kiuj eĉ 4000 horoj da sistema investado ne estus sufiĉa, sed ĉi lastaj kutime rezignas la kompletigon de la lernado.

La 2000 horoj de lingvolernado pli aŭ malpli egalas al la nombro de la horoj de laboro plus aktiva ferio de unu jaro, sed plenumeblas kutime nur distribuate laŭ pluraj jaroj. Pro tio studentoj alvenintaj al fremda lando por studoj, do havantaj pli altan ol averaĝan spiritan nivelon (tamen eble malaltan lingvan) plej ofte devas dediĉi duonan aŭ tutan lernojaron al organizita lingvolernado, kaj nur poste ili kapablas efike partopreni en la normala universitata lernoprogramo.

La lernado de pluaj lingvoj postulas malpli multan tempon, ekz. la dua ĉ. 1600, la tria ĉ. 1400 horojn ktp., kompreneble depende ankaŭ de la gradoj de parenceco inter, kaj la simplecomalsimpleco de, la elektitaj lingvoj. La menciitaj hornombroj involvas la horojn pasigitajn en grupo sub la gvido de lingvoinstruisto, plus tiujn por la individua lernado-praktikado.

Laŭ tio, la alproprigo de unu fremda lingvo, ekz. la angla, sur la menciita nivelo, inter la cirkonstancoj de la Eŭropa Unio, sed modeste kalkulante per horsalajro de 10 EUR/h, kostas propran labortempon valoran 20.000 horojn, al kio aldoninte 10%-ojn kiel instrukoston, **la alproprigo de la unua fremda lingvo valoras 22.000 EUR**. (Mi notas, ke laŭ la statistika instituto de EU, *EUROSTAT*, en la jaro 2003 la averaĝa salajro en EU estis 22,7 EUR/lh (lh=laborhoro), dum en la landoj, estintaj aliĝontaj en 2004, tio estis 4,21 EUR/lh).

Post la Barcelona decido en 2002 de la Eŭropa Konsilio, la Eŭropa Komisiono ellaboris detalan rekomendon [*European Commission* 2002], kiu rekomendas al **ĉiu eŭropano** la lernadon de **tri fremdaj lingvoj**. Laŭ la ĉi supraj la lernotempo averaĝe bezonata perkape por tio estas 2000 + 1600 + 1400 = 5000 horoj (= 2,5 ĝis 3 laborjaroj laŭlande, distribuate dum pluraj jaroj), kiu kostas propran labortempon valoran je 50.000 EUR/kapo, plus 5000 EUR/kapo da instrukosto, t.e. la tuta lernokosto estos 55.000 EUR/kapo.

Mi mencias, ke por la plibonigo de la instruado de komputiko kaj unu fremda lingvo, nun en Hungario la tempo de la mezlerneja instruado fariĝis plilongigita per unu jaro. Rilate la lingvon la edukministerio volas atingi, ke la lernantoj kapablu fari la mezgradan ŝtatan lingvoekzamenon antaŭ la maturekzameno. Tiel aŭtomate plimallongiĝas la laborperiodo ĝis la pensiuliĝo, do oni elŝaltis la ĝenerale plej bone salajratan lastan laborjaron. Aliel dirante do la situacio estas, ke en la ĝisnunan normalan lernotempon ne povas esti enpremita la vere necesa lernotempo aŭ de la lingvoj, aŭ de la fakaj studobjektoj. Do la lernantaro komencas labori (aŭ pli altnivele lerni) kun nesufiĉa scio, aŭ ili devas certigi per plua(j) lernojaro(j) la necesan edukitecon pri kaj la fakobjektoj, kaj la lingvoj.

En mia ĉi antaŭa skiza trarigardo pri la kostoj de la lingvolernado senemfaze mi konsideris nur la t.n. **naturajn lingvojn** (eĉ el ili mi pensis nur pri la plej evoluintaj eŭropaj naciaj lingvoj), kies beletra kaj fakliteratura evoluinteco nuntempe estas la plej altnivela.

Sed estas sendube, ke la plej malnovaj kaj plej evoluintaj grandaj aziaj lingvoj la saman nivelon jam atingis, aŭ post nelonge atingos, eble superos. Eĉ la ĉinaj tekstoj – en la latinkaraktera kaj -ampleksa *pinjin*a alfabeto, konsistanta el la 26 „anglatinaj" literoj, plus *ö* kaj kelkaj supersignoj – estas enmeteblaj en kiun ajn eŭropan aŭ amerikan komputilon, kaj ĉi tiel, aŭ – post enkomputiligo de konvena softvaro – ankaŭ per ĉinaj ideogramoj, estas aperigeblaj surekrane aŭ printeblaj surpapere.

Tamen mi pensas, ke ĝia lernado, eĉ nur per latinlitera skribo, bezonas verŝajne pli aŭ malpli la saman tempodaŭron, kiom tiu de iu eŭropa lingvo, kaj kune kun la ideogramoj eĉ pli. Kaj tio validas ankaŭ al la aliaj lingvoj kun nelatina skribo.

Eĉ hodiaŭ mi ne forgesis la okazon, kiam iu studentkolego mia, post trimonata lernado de la rusa, post ĝema pripensadeto laŭtlegis la vorton радио (radio, prononcu: radjio) kiel "padno".

Notoj

1 Iom ampleksigita traduko el la hungarlingva seĝokupa prelego (*Egyenjogúság és gazdaságosság a nemzetközi kommunikációban*) prezentita de novelektita orda membro (ĝis 2004 koresponda membro) de la Hungara Scienca Akademio (HSA), *Ottó HASZPRA*, en la Sekcio de Teĥnikaj Sciencoj de la Akademio, la 14-an de aprilo 2005.

2 *Sandor GIESSWEIN* (1856-1923) papa prelato, teologo, filozofo, religihistoriisto, lingvisto. Koresponda membro de HSA (1914-1923). Prezidanto de la Hungara Esperanto-Societo (1911-1923). La unua, multrilate tre aktiva, esperantisto en la deputitaro en la hungara parlamento (1914-1923) kun kristana socialista programo.

3 *Károly SIMONYI* (1916-2001) dipl. fizikisto, dipl. maŝininĝeniero. Membro de HSA, koresponda 1993-1995, orda 1995-2001. Internacie rekonata fakulo. Membro de la Eŭropa Akademio de la Sciencoj kaj Artoj kaj de la Londona Instituto de Elektro-Inĝenieroj. Profesoro de la Budapeŝtan Teĥnika k.a. universitatoj. Bonege parolis Esperanton kaj forte rekomendis ties enkondkon en ĉiujn lernejojn. Liaj faklibroj aperis en pluraj lingvoj.

[4] En Hungara Scienca Akademio estas du akademiaj gradoj: "koresponda" kaj "orda".

[5] *Jean August* INGRES (1780-1867) elstara franca pentroartisto kaj grafikisto, kiu eminente kaj plezure ankaŭ violonludis (*Gábor* 1972).

[6] Protobulgaroj: batalema nomada popolo kun tjurka lingvo, kiuj, migrante de la rivero Volgo al la nordoriento de Balkanio, konkeris la tieajn grandnombrajn (sed ne unuiĝintajn) slavojn, kaj fondis la unuan "bulgaran imperion" (681 – 1018). Dume ili slaviĝis, sed ilian nomon konservis kaj la popolo kaj la lingvo kaj la lando (българи, български, България = bulgaroj, la bulgara, Bulgario).

Literaturo

Berend T. Iván 2003: *History derailed: Central and Eastern Eŭrope in the "long" 19th century* (Historio dereliĝinta: Meza kaj Orienta Eŭropo en la "longa" 19-a jarcento). *University of California Press, Berkeley.*

Budai Ésaiás 1802: *Régi tudós világ históriája* (Historio de la malnova scienca mondo). *Szigethy Mihály, Debrecen.*

European Commission, Staff of the, 2002: *Promoting Language Learning and Linguistic Diversity. Working paper. European Commission, Brussels, November* 13.

Gábor György 1972: *Ingres hegedűje* (La violono de *Ingres*). *Magvető, Budapest.*

Strabón 1977: *Geógraphika. Gondolat, Budapest.*

Adreso de la aŭtoro

Prof. Haszpra Ottó
Húr u. 9 A 111 Iph. 1/3
HU – 1223 B u d a p e s t
HUNGARIO

<othasz@gmail.com>

Priaŭtora informo

La aŭtoro estis universitata profesoro kaj gvidanto de la Katedro pri hidraŭliko kaj hidroteknika konstruado kaj direktoro de la Instituto pri hidroteknika konstruado kaj akvomastrumado en la Budapeŝta Teknika kaj Ekonomika Universitato. Koresponda membro (1998 – 2004), poste orda membro (2004 –) de la Hungara Scienca Akademio.

Tombo,
Grab, grave, grob, sepolchro, tombeau, tumba:
Etimologiaj kaj semantikaj rimarkigoj pri la plurlingveco de Eŭropo

Wolfgang VIERECK

Enkonduko

Krom la motivaj mapoj (pri ties komprenoj kp. *Viereck* 2000) la eŭropa lingvoatlaso (*Atlas Linguarum Europae*) prezentas ankaŭ onomasiologiajn mapojn, en kiuj la esprimoj estas interpretataj kaj etimologie kaj semantike.

Antaŭ nelonge mi pritraktis la esprimon ‚laboristo' (*Viereck* 2004), kaj nun vortoj por ‚tombo' estas analizataj en kelkaj eŭropaj lingvoj. Estas respondoj al la demando: „*Quel est dans votre dialecte le nom du trou dans la terre où l'on met le mort*?" [Kio estas en via dialekto la vorto por la truo en la tero, en kiun oni metas la mortintojn?]

Tiuj vortoj estas tre malnovaj en la eŭropaj lingvoj. La unuaj formoj de entombigoj jam troviĝas en la paleolitiko.

1. Etimologiaj rimarkigoj

Tiuj dividiĝas en rimarkigoj pri hindeŭropaj kaj ne-hindeŭropaj lingvoj. Mi komencos per la unuaj, ĉar ili klare superregas en Eŭropo[1].

1.2. Hindeŭropaj lingvoj

La modernajn terminojn por tombo en tiuj lingvoj oni povas devenigi de jenaj ok radikoj.

1.2.1 Hindeŭrope **ghrebh-* ‚fosi', ‚grati', ‚skrapi' (*Pokorny* 1959, 455s.), ?**g^hreb^h-* ‚fosi' (*Rix & Kümmel* 2001, 201)

La esprimo por la truo en la tero, en kiun oni metas la mortintojn deriviĝas en la plej multaj eŭropaj lingvoj de tiu radiko. Ĝi evoluis en la ĝermanaj lingvoj al gote kaj malnov-altgermane *graben,* malnov-angle *grafan* kaj malnov-norde *grafa.* De tiuj verboj oni derivis substantivojn, nome malnov-altgermane *grap* > novaltgermane *Grab,*